
话简

# Mikrofone

(Oktobre-Decembre, 2007)



## Sukcese okazis la 17-a Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

## Ĉinio sukcese pafis en spacon la unuan lun-sondan sateliton

## 2008 – Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj

## Vizito al la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio

CRI 中国国际广播电台世界语部
Esperanto-redakcio de ĈRI

N.20

# Enkonduko





En tiu ĉi momento ni pretas diri adiaŭon al la jaro 2007. Tiu ĉi jaro estas prospera ne nur por nia Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia, sed ankaŭ por Ĉinio, nia patrolando!

En 2007 nia redakcio akiris grandan progreson en ĉiu-flankaj laboroj: Nia kuriero Mikrofone fariĝis gazetforma kaj enhave pliriĉa; ni novigis la reton; ni sukcese okazigis la konkurson "Sichuan – Hejmloko de Granda Pando"; kaj tiel plu. Kompreneble ĉi tiujn atingojn ni ŝuldas al vi, niaj karaj amikoj, kiuj ĉiam subtenas niajn laborojn. Tion atestis la rekorda nombro de viaj leteroj kaj mesaĝoj – sume do pli ol 7 000 korespondaĵoj, de ni ricevitaj en la jaro 2007. Pro tio mi elkore dankas vin!

En 2007 Ĉinio gajnis rimarkindajn atingojn en la kampoj politika, ekonomia, diplomatia, kultura, sciencteknika kaj aliaj. Estis atentata de la tuta mondo la 17-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, en kiu naskiĝis la nova gvidantaro de la Partio. La sukcesa pafo de la 1-a lunsonda satelito "Chang'e n. 1" montris al la tuta mondo la sciencteknikan forton de Ĉinio. La 1-a Somera Jarkunveno de Davos okazinta en la ĉina urbo Dalian manifestis, ke Ĉinio okulfrapas en la mondo per daŭra kaj mirakla kreskado de sia ekonomio. Pri ĉio supre menciita vi legos detalajn raportojn en tiu ĉi numero.

La baldaŭ venonta jaro 2008 estos kompreneble pli ekzalta: ĝi estos la jaro de la Pekinaj Olimpikoj! Nun glate iras ĉiuj preparaj laboroj. Celebre al la aŭguste okazontaj Pekinaj Olimpikoj, Ĉina Radio Internacia aranĝos novan konkurson. Mi esperas, ke la speciala premio trafu unu el vi kaj tiu, iasence vin reprezentante, povu ĝui senpagan semajnan restadon en Pekino! Do legu koncernajn artikolojn pri la Pekinaj Olimpikoj en tiu ĉi numero, kiuj certe helpos al vi respondi la demandojn.

Je la alveno de la nova jaro, bonvole akceptu miajn elkorajn bondezirojn! Mi ankaŭ esperas, ke niaj elsendo, reto kaj gazeto estu daŭre subtenataj de vi ĉiuj!

Sincere via,

Jianping Zhao



# Sukcese okazis la 17-a Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio

Oktobre, plensukcese okazis en Pekino la septaga 17-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio. En inaŭguro de la 15-a de oktobro, nome de la lasta Centra Komitato de la partio, ĝenerala sekretario Hu Jintao faris raporton sub la titolo "Alte tenante grandan standardon de socialismo kun ĉina trajto, ni batalu por gajni novan venkon en la ĉiuflanka konstruado de bonhava socio". La ĉefa enhavo de la raporto estas: retrospektivo de la laboro en la pasintaj 5 jaroj, teoria resumo pri la historia procezo de la ĉinaj reformado kaj malfermo en la pasintaj proksimume 30 jaroj, enteno de la scienca koncepto pri evoluigo kaj ĝia grava signifo por la ĉina evoluado, kaj aranĝo de la laboroj por la estonteco de Ĉinio en la kampoj ekonomia, politika, kultura, socia, nacidefenda, diplomatia, ŝtat-reunuiga, parti-konstruada kaj aliaj.

En la raporto Hu Jintao reasertis la konsekvencan principan starpunkton de la Komunista Partio de Ĉinio pri la taiwan-a problemo. Li solene apelaciis, ke sur la bazo de la principo pri unu Ĉinio, la du bordoj interkonsiliĝu por fini la antagonisman staton kaj atingi pacan interkonsenton.


Parolante pri la eksteraj rilatoj, Hu Jintao diris: "Ĉinio firme kaj senŝanceliĝe iras la vojon de paca evoluado kaj ĉiam praktikas la malferman strategion de reciproka utilo kaj komuna gajno, kaj atentas justajn interesojn de la alia flanko, precipe de la evoluantaj landoj."



La 21-an de oktobro, la 17-a Kongreso triumfe fermiĝis en Pekino, fininte elekton de la nova Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj de la Disciplino-Kontrola Komisiono sub la Centra Komitato de la Partio kaj aliajn taskojn. En la kongreso oni unuanime konsentis skribi en la Partian Statuton la sciencan koncepton pri evoluigo.

La 22-an de oktobro, en Pekino, okazis la unua plena sesio de la 17-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. En la sesio, Hu Jintao, Wu Bangguo, Wen Jiabao, Jia Qinglin, Li Changchun, Xi Jinping, Li Keqiang, He Guoqiang kaj Zhou Yongkang estas elektitaj kiel membroj de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio. Hu Jintao estas elektita kiel ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, prezidanto de la Milita Komisiono de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

*Antaŭ kaj dum la Kongreso, ĝenerala sekretario de Pakistana Esperanto-Asocio, Jawaid Eahsan kaj Trioli Renee el Francio kaj multaj aliaj sendis al ni gratulon al la Kongreso kaj deziras al ĝi plenan sukceson. Franca amiko Trioli Renee plej interesiĝas pri la respekto de Ĉinio al la homaj rajtoj. Trioli Renee aparte volas scii: Ĉu la ĉinaj laboristoj, kiuj intensive laboras, rajtas ĝui la minimumajn rajtojn ripozan, sanprotektan, kunvenan kaj de libera parolado? Ni ankoraŭ aranĝos por Trioli Renee kaj aliaj koncernajn programerojn pri tiuj temoj.*






*Dum la Kongreso sendis al ni mesaĝon ankaŭ prezidanto de UEA Probal Dasgupta kaj eksprezidantoj d-ro Renato Corsetti el Italio kaj Lee Chong-Yeong el Korea Respubliko.*

*Probal Dasgupta skribis en sia mesaĝo: "Mi atente sekvas la ŝanĝiĝojn en Ĉinio. Mia patro siatempe estis historiisto, kiu pionire instruadis la historion de Ĉinio en la universitato de Kolkata, kaj tial jam en la infanaĝo mi multegon aŭdis pri Ĉinio. Mi estas granda admiranto de via kulturo kaj de viaj kontribuoj al la Esperanta mondo.*

*"Nun la evoluo de Ĉinio ŝajnas pli definitive konverĝi kun tiu de Usono. Povas esti, ke la gvidantoj de la hodiaŭa Ĉinio rigardas la anglan kiel neŭtralan kaj ne kiel aparte usonan. Mi kun la plej alta estimo tamen petus, ke ili repensu pri la temo. Uzante tro malekvilibre la anglan, oni preskaŭ neeviteble kontribuas al unupolusigo de la monda ordo.*

*"La historio de la moderna Ĉinio donis gravan rolon al Esperanto kaj al neŭtrala vizio de internacieco kongrua kun la socialismo. Mi tre esperas, ke malfermante la pordojn al la mondo, okaze de ekzemple la Olimpikoj, Ĉinio faros sufiĉe da fortostreĉo ankaŭ rilate siajn Esperantajn pordojn."*

*Lee Chong-Yeong skribis en sia mesaĝo, ke Ĉinio estas granda lando, loĝantare kaj ekonomie. Sed en politikaj kaj aliaj okazoj, Ĉinio levas voĉojn nur al tiuj problemoj, kiuj influas rekte Ĉinion. Pro tio Ĉinio estas ne rigardata kiel "monda gvida forto". Lingve, kvankam la ĉina lingvo estas unu el la ses oficialaj lingvoj en UN, fakte ĝi estas la plej malofte utiligita kaj malofte uzata en la instancoj de UN. Ĉinio havas la rajton postuli la ĝeneralan sekretatrion de UN enmeti "la mondan lingvan problemon" kiel tagorderon de la venonta Ĝenerala Asembleo.*

*Pri la estonteco de Ĉinio, eksprezidanto de UEA Renato Corsetti skribis en sia mesaĝo: "Ĉinio certe daŭrigos sian kreskon kaj pliigos sian gravecon en la mondo. Estus tre bele, se ĝi povus restarigi la ekvilibron en internaciaj rilatoj. Por fari tion certe kopiado de la kapitalisma sistemo kaj amasa lernado de la angla enlande ne estas la plej bonaj rimedoj. Valorus konsideri sistemon liberan sed kun fortaj socialismaj elementoj en ĝi kaj instruadon de Esperanto kiel signo de kultura libereco."*

*Tuj post la fermo de la Kongreso, s-ro Jiri Patera el Ĉeĥio sendis leteron, gratulante pro la bonaj rezultoj de la Kongreso, kiu skizis novajn direktivojn por plua evoluo de Ĉinio, por progreso de la ĉina ekonomio kaj por la harmonia ĉina socio kaj harmonia mondo.*

*Li opiniis, ke la konsiderindan ekonomian disvolviĝon, la disvolviĝon kulturan, sciencan kaj teknikan, kaj el tio rezultantan kreskon de la politika signifo de la lando ŝuldas Ĉinio al la Komunista Partio de Ĉinio. Li skribis: "Ŝajnas al mi, ke la pozitivaj tendencoj en la evoluo de Ĉinio povis efektiviĝi pro tio, ke la politikaj gvidantoj de la KPĈ sciis utiligi la specifajn ĉinajn trajtojn kaj bezonojn en la ideologio de la Partio. Por ke Ĉinio daŭrigu plu sian vojon al riĉa kaj sukcesa potenco kun riĉa kaj feliĉa loĝantaro, tiam estas necese, ke ĝin ĉiam plu gvidu la unueca, saĝa kaj celkonscia Komunista Partio de Ĉinio. Serĉi aliajn manierojn en la nuna tempo, en la nuna ŝtupo de la disvolviĝo, estus tre nekonvene kaj malsaĝe."*

*Ni kore dankas ĉiujn, kiuj prezentis pozitivajn komentojn!*



# Ĉinio sukcese pafis en spacon la unuan lun-sondan sateliton




La 24-an de oktobro, en la satelito-pafejo Xichang, Ĉinio per transporta raketo "Changzheng n. 3A" glate pafis en la spacon la unuan lun-sondan sateliton "Chang'e n. 1", sendepende esploritan kaj faritan de Ĉinio mem. Tio markas, ke Ĉinio faris gravan paŝon en la lun-sonda programo. En la 7-a de novembro la satelito glate ekflugis en laboran orbiton kaj en la lasta tagdeko de novembro malfermis ĉiujn sondilojn por la kvar taskoj pri unujara scienca sondado. Antaŭtagmeze de la 26-a de novembro la ĉina Ŝtata Spaciala Buroo publikigis lunsurfacan bildon, unuafoje senditan de la ĉina lun-sonda satelito Chang'e n. 1. Tio signas plenan sukceson de la ĉina unua lun-sonda projekto.

Ĉinio persistas en la celo pri paca utiligo de la spaco kaj feliĉigo al la homaro, kaj volontas fari kunlaboron kaj interfluon kun diversaj landoj laŭ la principo "egaleco, reciproka utilo, paca utiligo kaj komuna evoluado".

*Post sukcesa lanĉo, gesinjoroj Katrin kaj Ru Bossong el Nederlando kaj aliaj mesaĝe sendis al ni Gratulon kaj bondezirojn. Ili skribis: "Ni ne dubas, ke oni sukcesos surluniĝi post nelonga tempo, komence sen homoj sed poste kun teranoj. Malmultaj homoj en la mondo povis atendi, ke en tiel mallonga tempo post la lanĉo de la unua ĉina sputniko, nun la ĉinaj spacialaj teknikistoj kaj ekspertoj havas tian sukceson, pri kio nun la tuta mondo estas atestanto kaj miregas."*

*Ni kore dankas ĉiujn gratulintojn, kiuj ĉiam zorgas pri ĉina evoluo!*




# La 1-a Somera Jarkunveno de Davos okazis en Ĉinio




Septembro, okazis en la urbo Dalian de la provinco Liaoning, nordorienta Ĉinio, la 1-a Somera Jarkunveno de Davos. Ĉina ĉefministro Wen Jiabao ĉeestis al la inaŭguro kaj faris salutparoladon. Li esprimis, ke Ĉinio daŭre tenas stabilan kaj rapidan kreskadon de ekonomio kaj samtempe klopodas por malrapidigi tutgloban klimatan ŝanĝiĝon. En sia parolo, Wen Jiabao ankaŭ emfazis tion, ke Ĉinio persistos en sia politiko de ekstera malfermo, senĉese perfektigos siajn eksterekonomian sistemon kaj leĝan sistemon kaj plifortigos kunlaborojn kun diverslandaj entreprenistoj surbaze de la principo de egaleco kaj reciproka utilo.

Wen Jiabao montris: "Nuntempe oni devas preni bremsadon de trovarma ekonomia kreskado kiel la ĉefan taskon de makroskopa reguligado kaj daŭre antaŭenpuŝi la reformadon de la mekanismo de kurza formiĝo por pligrandigi la elastecon de la kurzo de renminbi. Per plifortigo kaj perfektigo de la makroskopa reguligado, la ĉina ekonomio kompreneble antaŭenmarŝas konstante kaj stabile."

La menciita Forumo estas rigardata kiel la plej altanivela neoficiala internacia ekonomia forumo. De sia fondiĝo en la jaro 1971, ĝi ĉiu-jare okazigas sian jarkunvenon en Davos, pitoreska skiejo en Svislando. Nuntempe tiu ĉi Forumo jam posedas pli ol mil membrojn, ĉiuj estas renomaj entreprenoj kaj kompanioj de diversaj lokoj de la mondo. Krome la Forumo ankaŭ havas diverskarakterajn membrajn organizojn de kampoj politika, ekonomia, kultura, religia, ĵurnalisma, erudicia kaj aliaj.

# 2008 – Konkurso de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj

Post praktiko de la reformado kaj malfermo en la pasintaj proksimume 30 jaroj, Ĉinio gajnis monde atentatajn atingojn en la kampoj ekonomia, politika, nacidefenda, diplomatia, scienca kaj aliaj. Oktobre, Ĉinio glate pafis en la spacon la unuan lun-sondan sateliton "Chang'e", sendepende esploritan kaj faritan de Ĉinio mem. Tiu ĉi alta scienc-teknika frukto markas, ke Ĉinio faris gravan paŝon en la lun-sonda programo. Nun Ĉinio aktive faras preparajn laborojn por Pekinaj Olimpikoj en 2008. Por ke vi pli multe konu Ĉinion, precipe pli bone sciu pri Pekinaj Olimpikoj, Ĉina Radio Internacia okazigos "2008 – Konkurson de Scioj pri Pekinaj Olimpikoj".

Koncerne al la Konkurso ni elsendis sume 4 artikolojn de la 19-a ĝis la 22-a de novembro kaj elmetis en ĉiu artikolo du demandojn respektive. La ripeto de la 4 artikoloj okazis de la 20-a de decembro. La lasta ripeto okazos ĉirkaŭ la 25-a de venonta februaro. Ni bonvenigas vin aŭskulti ĝustatempe. La limdato de la Konkurso estas la 1-a de majo, 2008.

Same kiel antaŭe ni establis premiojn specialan, unuan, duan kaj trian. La gajnintoj de la speciala premio ĝuos senpagan vojaĝon en Pekino en la venonta junio. Ni atendas vian aktivan partoprenon. Ni esperas, ke iu el vi fariĝos gajninto de la speciala premio.





# Preparado por Pekinaj Olimpikoj iras glate

La 13-an de julio de la jaro 2001 en Moskvo okazis la 112-a plena sesio de la Internacia Olimpika Komitato, en kiu Pekino gajnis la rajton okazigi la Somerajn Olimpikojn, 2008. Decembre de tiu ĉi jaro fondiĝis la Pekina Olimpika Organiza Komitato kaj oficiale komenciĝis la preparado por la olimpikoj, kiuj okazos de la 8-a ĝis la 24-a de aŭgusto, 2008.

En la pasintaj 6 jaroj Pekino faris grandan klopodon por la olimpika preparado. Sinjoro Wang Wei, plenuma vicprezidanto de la Pekina Olimpika Organiza Komitato, diris al raportistoj, ke post la fondiĝo la Organiza Komitato difinis por si la celon okazigi altnivelajn olimpikojn kun distingaj trajtoj. Li diris: "Okazigi altnivelajn olimpikojn kun distingaj trajtoj estas la solena promeso, farita de Ĉinio al la mondo, kaj ankaŭ la postulo kaj deziro de la ĉina registaro kaj la ĉina popolo. Ĝenerale diversaj laboroj koncernaj al la preparado iras glate laŭ la plano."

Laŭ sinjoro Wang Wei, la difinita celo okazigi altnivelajn olimpikojn kun distingaj trajtoj montriĝos en 8 flankoj: altnivelaj konkursejoj, instalaĵoj kaj organizado de konkursoj; altnivelaj inaŭguro, fermo kaj kulturaj aranĝoj; altnivela gazetara servo; altnivela sekureca gardo; altnivela volontula teamo; altnivelaj trafiko kaj servado; altnivelaj civilizaciaj trajtoj; kaj eminentaj atingoj de diverslandaj sportistoj.

Post la intensa laboro en ĉirkaŭ 6 jaroj la celo pli kaj pli proksimiĝas. Wang Wei diris, ke konstruado de olimpikaj konkursejoj, la plej grava parto de la preparado, tre kontentigis la Internacian Olimpikan Komitaton. 10 el 37 nove konstruataj olimpikaj konkursejoj jam kompletiĝis, kaj la ceteraj finkonstruiĝos en la fino de tiu ĉi jaro krom olimpika ĉefsportejo, la Nacia Stadiono, kiu kompletiĝos en la venonta jaro pro la projekto de la inaŭguro. Organizado de diversaj konkursoj profundiĝis, kaj la tagordo de ĉiuj konkursoj estas fiksita. Konstrukcio de la

inaŭguro kaj fermo de la olimpikoj fundamente plenumiĝis, kaj baldaŭ oni komencos la praktikon kaj provludon. Zhang Yimou, internacie fama filmdirektoro, funkcias kiel la ĉefreĝisoro de la inaŭguro. Krome ankaŭ itinero de stafetkurado de la olimpika torĉo publikiĝis. Pekino intencas, ke la torĉo ascendu la montpinton Ĉomolangma dum la vojaĝo por aldoni imagon pri la stafetkurado, kiu komenciĝos en la venonta jaro.

Preparado por la olimpikoj ricevis fervoran subtenon de pekinanoj kaj ĉinaj popol-amasoj, tio plene montriĝis en la varbado de olimpikaj volontuloj. Al la olimpikoj necesas ĉirkaŭ dek mil volontuloj servontaj al diversaj konkursoj. Ĝis la fino de julio pli ol 500 mil homoj sin anoncis aliĝi al la volontula teamo. Granda subteno de ĉinaj popolanoj profunde impresis la Internacian Olimpikan Komitaton. Wang Wei diris: "Varbado de olimpikaj volontuloj startis unue en la ĉina ĉeftero kaj poste en Hongkong, Aomen, Taiwan kaj transmaraj regionoj. Ĝis la fino de julio pli ol 560 mil homoj sin anoncis. Ni garantias ne nur la nombron, sed ankaŭ la kvaliton."

Al olimpika urbo necesas perfekta trafiko kaj bonaj cirkonstancoj. Pekino faris grandan klopodon en tiuj ĉi du kampoj kaj akiris grandan progreson. Por mildigi la premon el olimpika trafiko, Pekino intensigis la konstruadon de tramvoja trafiko en la pasintaj 6 jaroj. Ĉiuj metrolinioj, nove konstruataj por la olimpikoj, kompletiĝos en la venonta jaro. Tiam la pekina tramvoja trafiko atingos 200 kilometrojn, la historian rekordon, tio garantios la publikan trafikon dum la olimpikoj.

Krome Pekino faris grandan klopodon por bonigi medion. De la jaro 1998 ĝis la fino de 2006 Pekino investis 12,2 miliardojn da usonaj dolaroj kaj plenumis pli ol 20 gravajn medi-bonigajn programojn. Wang Wei diris, ke Pekino intensigos plu diversajn laborojn laŭ olimpika kutimo kaj koncernaj instrukcioj de la ĉina registaro. Li diris: "Ni elkore esperas, ke ĉiuj priatentu kaj partoprenu plu la olimpikan preparadon kaj klopodu por okazigi altnivelajn olimpikojn kun distingaj trajtoj kaj konstrui pli belan kaj harmonian mondon."

# Slogano kaj talismanoj de Pekinaj Olimpikoj


Por pli bone diskonigi ideon de la Pekinaj Olimpikoj kaj konigi la ĉinan kulturon al la mondo, en la jaro 2005 la Pekina Olimpika Organiza Komitato publikigis sloganon kaj talismanojn de la Pekinaj Olimpikoj. Kiaj estas la slogano kaj talismanoj kaj kian signifon ili havas?

"Slogano de la Pekinaj Olimpikoj, 2008, estas Unu Mondo, Unu Songô." Vespere de la 26-a de junio, 2005, en la Pekina Laborista Stadiono, Li Changchun, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, proklamis la sloganon.

Olimpika slogano estas fajna kondensiĝo de la olimpika ideo kaj kulturo de la gastiganto. De post la Seulaj Olimpikoj, 1988, gastigantoj de ĉiuj olimpikoj prezentas koncizan sloganon. Ekzemple por la Atenaj Olimpikoj, 2004, grekoj fiere elkriis la sloganon Bonvenon al Hejmo. Tiu ĉi slogano esprimis la plej varman inviton al la monda olimpika familio kaj ankaŭ montris ĝojon kaj fieron de Grekio, la lando de olimpika origino, pro la olimpika reveno al la hejmloko.

Kian signifon havas la slogano de la Pekinaj Olimpikoj? La Organiza Komitato diris, ke la slogano Unu Mondo, Unu Songô, esprimas la komunan deziron de la mondo inspirita de la olimpika spirito strebi por la bela estonteco de la homaro kaj ankaŭ la ideon de la ĉina popolo posedi kune kun diversaj popoloj la belan hejmlokon, dividi civilizacion kaj krei la estontecon. La ĉina tradicia kulturo ĉiam emfazas la akordon inter la homaro kaj naturo kaj inter diversaj individuoj. Slogano de la Pekinaj Olimpikoj implicas harmonian disvolvon, pacan kunekziston kaj kunlaboron por kuna gajno, tio akordas kun tiuj ĉi elementoj en la ĉina tradicia kulturo. Sinjoro Zhang Yiwu, specialisto pri olimpikoj el Pekina Universitato, diris: "La slogano havas du gravajn punktojn, kaj ĝia kerno estas la mondo kaj songô. Unu Mondo signifas, ke Ĉinio havas malferman spiriton kaj volas kontakti la mondon, kaj Unu Songô esprimas la valorkoncepton de Ĉinio kaj la mondo al olimpikoj kaj aliaj amindaj aferoj, ekzemple al la paco."

La slogano estas konciza, tamen ĝi estas kristalaĵo de la kolektiva saĝeco. La 1-an de



januaro, 2005, la kultura sekcio de la Pekina Olimpika Organiza Komitato komencis peti la olimpikan sloganon en la monda sfero. Unu monaton poste la sekcio ricevis 2 100 kontribuojn el diversaj lokoj de Ĉinio kaj fremdaj landoj.

La 11-an de novembro, 2005, okaze de la mila tago antaŭ la Pekinaj Olimpikoj, oni senvualigis la 5 olimpikajn talismanojn Fuwa. Ili nomiĝas respektive Beibei, Jingjing, Huanhuan, Yingying kaj Nini. Kiel konate la ĉina kulturo estas tre ampleksa kaj profunda, tial oni kreis 5 talismanojn por pli bone esprimi la ĉinan deziron al la olimpikoj.

La 5 talismanoj Beibei, Jingjing, Huanhuan, Yingying kaj Nini havas la figurojn respektive de fiŝo, granda pando, olimpika fajro, tibeta antilopo kaj hirundo. Ili implicas la rilatojn kun maro, arbaro, fajro, tero kaj ĉielo, simbolas la akordon inter la naturo kaj homaro kaj konformas al la ideo Verdaj Olimpikoj, iniciatita de Pekino. Krome oni fandis en la dezajnon multajn elementojn de la ĉina kulturo. Ekzemple, la fiŝo-figuro de Beibei inspiriĝis el la ĉina tradicia novjara pentraĵo. Estas interese, ke en la ĉina lingvo unuaj silaboj el la 5 nomoj konsistigas la vortojn Pekino Bonvenigas Vin (Beijing Huanying Ni), kaj la 5 talismanoj prezentiĝas kontraste kun la olimpikaj ringoj. Sinjoro Kecan Gosper, vicprezidanto de la Akordiga Komitato de la Internacia Olimpika Komitato por la Pekinaj Olimpikoj, diris: "La talismanoj Fuwa de la Pekinaj Olimpikoj konsistas el 5 elfoj. Ili interligas unu kun alia same kiel 5 fingroj kaj prezentiĝas kontraste kun la 5 olimpikaj ringoj, tio enkorpigas la akordon inter la homaro kaj naturo kaj spegulas riĉan imagon, tial la olimpika movado devas danki Pekinon."

# Kunlaborantaj urboj de Pekinaj Olimpikoj

Laŭ aranĝo bezonata de la konkursoj, ne ĉiuj matĉoj de la Pekinaj Olimpikoj en 2008 okazos nur en Pekino. Futbalado okazos ankaŭ en Tianjin, Qinhuangdao, Ŝanhajo kaj Shenyang, velŝipado kaj ventsurfotabulado en Qingdao kaj ĉiuj matĉoj de rajdarto en Hongkong.

## Velŝipado

Velŝipado kaj ventsurfotabulado de Olimpikoj okazas sur maro. Pro tio, se kontinenta urbo gastigas Olimpikojn, tiuj du konkursoj senescepte okazas en apudmara urbo. Ekzemple, la 20-aj Someraj Olimpikoj okazis en la germana suda urbo Munkeno en 1972, la velŝipado okazis en la norda apudmara urbo Kiel. Kadre de la Pekinaj Olimpikoj en 2008 la velŝipado okazos en la ĉina orienta apudmara urbo Qingdao. La urbo situas ĉe la okcidenta bordo de Pacifiko, apudas al la Flava Maro, oriente rigardas trans maro al la Korea Duoninsulo kaj Japanio. Tie stabilas la ventoforto kaj akvofluo kaj estas ideala konkursejo de internacia velŝipado. Qingdao ankaŭ estas ĝardena urbo ombroriĉa kaj en- kaj eksterlande fama. Ruĝaj tegoloj, verdaj arboj, blua maro kaj la blua ĉielo kune manifestas la belan figuron de la urbo; kaj ruĝaj rifoj, zefiroj, koloraj veloj kaj oraj plaĝoj formas belan pejzaĝon. Difinite kiel kunlabora urbo de la Pekinaj Olimpikoj, la urbo renkontas pli da ŝancoj por evoluado. Urbestro Xia Geng konigis:

"Impulsate de la 'olimpika efekto', nia ekonomio relative rapide disvolviĝas de la lastaj jaroj. Olimpikoj alportas multe da ŝanĝiĝoj al la vivo de la urbanoj. Ekzemple, ilia enspezo pliiĝas daŭre. En la lastaj kvar jaroj la jaraj enspezoj de loĝantoj en la kvartaloj kaj antaŭurbo pliiĝis respektive je 15,1% kaj 11,8%, kaj en tiu ĉi tempodaŭro iliaj enspezoj plej rapide pliiĝis."



Tamen, la plej granda ŝanĝiĝo kuŝas en la fizionomio de la urbo. Laŭ statistiko, en la pasintaj kvar jaroj, preparante la velŝipadon, oni investis proksimume 20 miliardojn da juanoj de renminbi al la urba konstruado kaj la investoj al kuraca servo, kultura afero kaj trafiko jare kreskis 40%; la konstruado de bazaj instalaĵoj kreis proksimume 100 000 laborpostenojn. Pro tio, la urbo Qingdao, la ĝardena urbo, tenante plu sian belan naturan pejzaĝon, fariĝas ankoraŭ pli moderna kaj kultureca.

## Rajdarto

Rajdarto estas unu el la 28 konkursaj branĉoj de la Olimpikoj kaj ankaŭ ununura konkursado plenumata de sportistoj kaj animaloj kune, kaj pro tio ĝi estas ege aprecinda kaj interesa. En la 117-a konferenco de la Internacia Olimpika Komitato okazinta en 2005 en Singapuro, la Internacia Olimpika Komitato, Pekina Olimpika Organiza Komitato kaj Internacia Rajdarta Federacio atingis komunan konon pri tio, ke Hongkong aranĝu rajdartan konkurson de la Olimpikoj en

2008. Personoj el la internacia sportista rondo opiniis, ke Hongkong, kie okazas tradicie ĉevalkonkurso dum pli ol 100 jaroj, estas ideala konkursejo por la rajdarta konkurso de la Pekinaj Olimpikoj.



Ĉevalkonkurso estas ege ŝatata de hongkong-anoj. En ĉiu semajnfino okazas tia konkurso kaj ĉiufoje la spektantoj svarmas al la konkursejo. En julio 1997 sin liberiginte de la brita kolonia regado, Hongkong revenis al la patrolando; de tiam pasis dek jaroj. Prezidanto de Hongkong-a Olimpika Komitato sinjoro Huo Zhenting opinias, ke por Hongkong la rajdarta konkurso kadre de la Pekinaj Olimpikoj estas signifoplena ne nur rilate al sporto. Li diris:

"Dank' al la konkurso de rajdarto en Hongkong, hongkong-anoj fortigas sian apartenecon al la patrolando. Oni scias, ke Grekio, per sukcesaj Olimpikoj, potencigis sian sportan nivelon kaj ŝtatan forton. Plej gravas, ke la Olimpikoj servas kiel ŝanco stimuli la varman amon de gejunuloj al la lando. Tiel sama estas Hongkong. Se ni sukcese kunfunkciigus la rajdartan konkurson, tio certe donus multe da helpo, kaj pli grave donus pozitivan rolon al la gejunuloj. Kune kun la ĉefurbo de la patrolando okazigi la Olimpikojn tre gravas por aparteneco de hongkong-anoj al la lando."

La 7-an de julio 2007 la konkursejo kaj trejnaj instalaĵoj por rajdarta programo de la Pekinaj Olimpoj en 2008 finkonstruiĝis kaj ekfunkciis. En prova konkurso de rajdarto por la Pekinaj Olimpikoj, okazinta en aŭgusto, la instalaĵoj de la konkursejo estis ege laŭdataj de rajdistoj el diversaj lokoj de la mondo.


## Futbalado

Futbalado estas programo daŭranta plej longe por Olimpikoj. Oni fondis filiajn ludkampojn por la futbalado de la Olimpikoj. Dum Pekinaj Olimpikoj, kelkaj matĉoj de futbalo okazos respektive en Ŝanhajo, Shenyang, Qinhuangdao kaj Tianjin. Kaj pro tio pli da ĉinoj ĝuos la Olimpikojn.

Tiuj urboj ja estas ege entuziasmaj al la matĉoj. Ŝanhajo estas unu el la ĉinaj plej prosperaj kaj ekonomie plej vivipovaj urboj. En ĝi rapide marŝanta al modernigo plene manifestiĝas la ĉina ekonomia miraklo. Ŝanhajo ludas pli kaj pli gravan rolon en la monda ekonomio, siaflanke la mondo ĝin pli kaj pli alte atentas. Ankaŭ en la sporta kampo ĝia rolo pli kaj pli gravas. Tie okazis, okazas kaj okazos internacie ege gravaj konkursoj, ekzemple, tenisa majstra-pokala jarfina finalo, grandpremia monda-ĉampioneca aŭtokonkurso de Formulo 1, virina futbala mondpokalo 2007, monda ĉampioneca naĝ-konkurso 2011, Mondaj Someraj Specialaj Olimpikoj 2007. Naŭ futbalaj matĉoj kadre de la Pekinaj Olimpikoj okazos en Ŝanhajo. Ŝanhajanoj konvinkiĝas, ke tiuj gravaj konkursoj estas necesaj, ĉar ili spegulas la figuron de Ŝanhajo, eĉ de tago post tago freŝa Ĉinio. Urbestro Han Zheng diris:

"Laŭ mi, Ŝanhajo, malferma internacieca urbo, devas per tiuj konkursoj, enkorpigi la novan figuron de la reformado kaj malfermo de nia lando kaj enkorpigi la novan figuron de Ŝanhajo."

Ĉinio energie konstruas la nordan ekonomian centron, la municipon Tianjin, nordorientan ekonomian centron, la urbon Shenyang, kaj la orientan ekstremon de la Granda Muro, la urbon Qinhuangdao. Ankaŭ ili, same kiel Ŝanhajo, entuziasmo-plene preparas la futbalajn matĉojn kadre de la Pekinaj Olimpikoj, ili esperas dediĉi al diverslokaj amikoj de la mondo brilan konkurson kaj ĉarman kulturon en la jaro 2008.



# La Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio



En la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino troviĝas 13 maŭzoleoj de imperiestroj de Ming-dinastio. Ili okupas 40 kvadratajn kilometrojn. Dum la pasintaj centoj da jaroj tiuj maŭzoleoj suferis detruon de la naturo kaj homoj, sed iliaj ĉefaj konstruaĵoj restas kompare kompletaj kaj iliaj hipogeoj nedifektitaj.

En Ming-dinastio oni traktis mortintojn kiel vivantojn kredante, ke la animo de mortintoj daŭre vivos kiel vivantoj. Tial la 13 imperiestroj konstruis por si maŭzoleon tiom luksan kiom ilia palaco. Oni rigore observis geomancion en elekto de sidejo de maŭzoleo kaj projektado de la konstruaĵoj, akcentante harmonian kuniĝon de la maŭzoleoj kun la montoj, riveroj kaj flaŭro de la loko.

Antaŭ 2 300 jaroj en Ĉinio jam aperis speciala regiono de reĝaj maŭzoleoj. En Tang-dinastio aperis grupoj da imperiestraj maŭzoleoj sendependaj kaj interligitaj. Kaj la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio unuafoje montris la unuecon de imperiestraj maŭzoleoj. Ĉiu maŭzoleo havas siajn proprajn kultan halon, tomban turon kaj trezoran urbon (ĉirkaŭmurigita tombo), sed komunan Dian Vojon konstruitan por la unua maŭzoleo Changling.

Ĝis nun nur unu el la hipogeoj de la 13 maŭzoleoj estis malfermita. Ĝi estis hipogeo de Dingling-maŭzoleo. Oni prifosis ĝin en 1956 kaj trovis ĝin netuŝita. Oni ne trovis spuron de ŝtela prifoso al la aliaj hipogeoj. La ŝtona arkado, Ruĝa Pordego, Sankta Monumenta Kiosko, Ŝtonaj Korteganoj kaj Bestoj, Draka-Feniksa Pordo k.a. ĉefaj konstruaĵoj portas la originan guston. Prosperas antikvaj pinoj kaj cipresoj en la maŭzolea regiono. La areoj por tomboj de kromedzinoj kaj altrangaj eŭnukoj estis kulturataj kiel kampoj, sed la hipogeoj restis netuŝitaj. Sed la aliaj konstruaĵoj sur la tero jam disfalis kaj restas nur ŝtonaj skulptaĵoj.

Inter la 13 maŭzoleoj Changling estas la plej grandioza, kaj sole Dingling estas prifosita. Antaŭe la tuta maŭzolea regiono estis ĉirkaŭita de muro. Changling estas maŭzoleo de Zhu Di, la tria imperiestro de Ming-dinastio. La Kulta Halo estas ĝia ĉefa konstruaĵo. Dingling estis prifosita en 1956-1958. Nun ĝi estas muzeo de imperiestra maŭzoleo. Ĝi estas la 9-a inter la 13 maŭzoleoj.

La ŝtona arkado ĉe la suda ekstremo de la Dia Vojo estis konstruita en 1540. La arkado el blanka marmoro larĝas 28,86 metrojn kaj altas 14 metrojn. La sokloj de ĝiaj fostoj estis gravuritaj je diversaj bestoj. Ĝi estas la plej granda kaj plej malnova ŝtona arkado de Ĉinio.

### Ŝtonaj statuoj:

Ambaŭflanke de la Dia Vojo inter la Granda Monumenta Kiosko kaj Draka-Feniksa Pordo staras 24 ŝtonaj bestoj, inkluzive de leono, kamelo, elefanto, ĉevalo kaj aliaj mitaj bestoj, kaj 12 ŝtonaj civilaj kaj militaj korteganoj kaj merituloj. Ĉiu el ili estis farita el sola ŝtono en 1435, kiam oni riparis la maŭzoleojn Changling kaj Xianling.

### Yongling-maŭzoleo:

Sudoriente de Changling estas Yongling-maŭzoleo de imperiestro Shizong kaj liaj edzino kaj du kromedzinoj. Malpli granda ol Changling, sed tre delikata, ĝi konsistas el 3 kortoj kun 7 kultaj ĉambroj kaj 9 akcesoraj ĉambroj. Ĝi estas la plej komplete konservita inter la 13 maŭzoleoj. Ĝiaj konstruaĵoj estas ornamitaj per ŝtonaj gravuraĵoj, majstraĵoj de Ming-dinastio.

### Dingling-maŭzoleo:

Ĝi, situanta sudokcidente de Changling-maŭzoleo, estas tombo de imperiestro Zhu Yijun kaj liaj du edzinoj. La imperiestro decidis la sidejon de sia maŭzoleo en 1583, kiam li venis kulti prapatrojn. La konstruado komenciĝis en la sekvanta jaro kaj daŭris 6 jarojn laborigante 30 mil militistojn kaj metiistojn. Bedaŭrinde granda parto de la konstruaĵoj estis detruita. Malantaŭ la Tomba Turo estas tombo kaj hipogeo malfermita en majo de 1956. En ĝi arkeologoj trovis grandan nombron da trezoroj.

En 1957 la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio estis difinitaj de la pekina registaro kiel unu el la protektataj antikvaj konstruaĵoj. En 1961 la maŭzolearo estis difinita kiel ŝtatnivela protektata historia restaĵo. En 1982 ĝi estis difinita kiel unu el la 44 ĉefaj protektataj pitoreskejoj de Ĉinio. En julio de 2003 ĝi estis enskribita de Unesko en la Liston de Mondaj Heredaĵoj.



# La 7-a Ĉina Kongreso de Esperanto en Kantono

Vespere de la 6-a de decembro varme okazis la Interkona Vespero de la 7-a Ĉina E-Kongreso en Kantono, ĉefurbo de ĉina provinco Guangdong. En la kunveno ĉinaj esperantistoj vigle prezentis riĉkolorajn programerojn inkluzive de kantoj, dancoj, tajĝio, dramoj kaj instrumentoj.



Matene de la sekva tago en Kantona Hotelo inaŭguriĝis la Kongreso kun la ĉeftemo: lte tenante la standardon, science evoluigante kaj akcelante la harmonion, klopodadu por la nova venko de ampleksa konstruado de bonstata socio per Esperanto". Sume pli ol 300 esperantistoj inkluzive de samideanoj el Pollando, Finnlando kaj Hispanio partoprenis en la inaŭguro. La inaŭguron prezidis s-ro Yu Tao, vicprezidanto de Ĉina E-Ligo. En la inaŭguro parolon faris s-ro Chen Haosu, prezidanto de Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj prezidanto de Ĉina E-Ligo, s-ro Guo Xiaoyong, konstanta vicprezidanto de Ĉina Internacia Eldona Grupo kaj vicprezidanto de Ĉina E-Ligo, kaj s-ro Chen Mingde, vicestro de la urbo Kantono. En la parolo, gratulante la inaŭguron, ili jesis longtempan historion kaj pozitivan kontribuon de Esperanto en Ĉinio. Cetere, E-redakcio de Ĉina Radio Internacia ne nur faris intervjuojn, sed ankaŭ respondecis pri interpretado.

Estas menciinde, ke la inaŭguro speciale donis premiojn al lokaj E-asocioj kaj esperantistoj, kiuj faris elstarajn kontribuojn por Esperanto en la daŭro de la jaroj 2005 ĝis 2007.

Unu el la premiitoj estas s-ro Wang Chongfang kiu, preskaŭ tute sola, diligente kompilis "Grandan Vortaron Ĉina-Esperantan". Ĝojige, ke en ĉi-foja kongreso ĝi finfine estas eldonita kaj varme bonvenigata de ĉeestantoj. Ĉi tie, nia redakcio sincere gratulas s-ron Wang Chongfeng.

La kongreso fermiĝis posttagmeze de la 8-a de decembro, same en Kantona Hotelo. S-ro Yu Tao, vicprezidanto de Ĉina E-Ligo, prezidis la ferman ceremonion. Reprezentantoj de 4 grupoj difinitaj laŭregione kaj 4 fakaj grupoj fervojista, E-eduka, ekonomi-komerca kaj junulara raportis al kongresanoj diskuton pri la raporto de Ĉina E-Ligo. Ili unuanime opiniis, ke ĉinaj esperantistoj devas fari propran kontribuon por konstruado de la harmonia socio de Ĉinio kaj por la ĉina E-movado. S-ro Li Hongjie, direktoro de "El Popola Ĉinio", alte taksis la kongreson kaj esprimis elkoran dankon pro aktiva klopodo de LKK por la kongreso kaj pro kontribuoj de esperantistoj por la ĉina E-movado.

La kongreso fermiĝis en la himno de "La Espero". Karaj amikoj, ni plue atendu la venontan Kongreson!


















# Cititaj Leteroj – 海外飞鸿

## Informo de Leopold Patek el Aŭstrio:

La 31-an de oktobro finiĝis la limdato de la elekta kampanjo pri la nomo de la pandido de Yang Yang kaj Long Hui en la Viena Bestĝardeno. Al la kampanjo partoprenis 26 000 personoj. La 1-an lokon gajnis la nomo Fu Long (feliĉa drako). En decembro ĉina delegacio venos al Vieno por partopreni al la bapto de Fu Long. La vizitantoj de la Bestĝardeno ankoraŭ ne povas vidi la pandidon, sed en la amaskomunikiloj videblas jam ofte fotoj pri la pandido.

## Letero de Alain Chalm el Francio:

Mi sendis leteron kaj petis pardonon pro longa silento, ĉar mi preparis la Konkurson pri "Unu el la plej bonaj metiistoj de Francio". La prepara laboro postulis almenaŭ 250 horojn. Nun mi jam finis la verkaĵon kaj portis ĝin al Parizo.

Pro okupiteco, mi ne rekte aŭskultas vian elsendon, sed kiam okazas la elsendo, mi ŝaltis mian radioaparaton kaj apude estas metita MP3, kiu samtempe registras nian programon. Sekvantan matenon mi aŭskultas la programon, promenante kun mia aminda hundo Urka kaj preparas aŭskultraportojn.

*Laŭ nia scio, Alain Chalm ne estas la sola. Nemalmultaj faras same kiel li, kiam okazas kontraŭdiro inter laboro kaj aŭskultado, ili do sonbendigas la programon kaj poste aŭskultos ĝin en oportuna tempo. Ni fieras, ke ni havas nombron da tiaj fidelaj aŭskultantoj, kiuj persistas aŭskulti nin malgraŭ okupiteco.*

## Dankletero de doktoro Till Dahlenburg el Germanio:




Sincere mi dankas vin pro la konstanta informado pere de viaj elsendoj kaj Mikrofone kun interesaj novaĵoj en via lando kaj la internacia Esperanto-Movado.

Por esprimi dankon, mi donacas al vi mian lastatempe eldonitan libron pri stilfiguroj en la poezio de Esperanto " Pli lume la mallumo zumas…"

*Ni tre dankas doktoron Till Dahlenburg. La libro estas esperantlingva vortaro kun difinoj kaj instruaĵoj en la internacia poemkreado kaj estas tre utila al esperntistoj, precipe por poemŝatantoj.*

## Mesaĝo de Josef Kriz el Ĉeĥio:

Mi tre volonte plenumas karan devon – danki vin por belega donaco, kiun mi ricevis, kiel premiaĵon por la unua loko en la Konkurso – 'Sichuan – Hejmlando de Granda Pando'.



Kian grandan ĝojon mi havis, tralegite la resumon de la konkurso en la bulteno 'Mikrofone'! Des pli granda mia ĝojo estis, ke kiam mi ricevis en nia poŝtofica giĉeto paketon, arda scivolemo tuj pelis min hejmen kaj rapidege elpaki ĝin. Kia beleco, kia valoraĵo, raraĵo en nia mezeŭropa regiono! Vere, mi estis ege surprizita. Koregan dankon al vi por la kovrilo, kiu poreterne rememorigos al mi partoprenon en la konkurso anoncita de ĈRI. Mia kortuŝo estis tiom forta, ke mi devis tuj sciigi mian ĝojon al miaj interretaj geamikoj, ĉeĥaj kaj eksterlandaj. Reveninte de laboro, mia kara edzino restis ŝtone staranta, kiam



ŝi vidis la premiaĵon. Al vi apartenas ankaŭ ŝia dankemo.

Informiĝinte, ke mi estas gajninto de la unua premio de la konkurso, la estro tuj invitis min al sia oficejo. Ĉeestis al la akcepto eĉ direktorino de la oficejo Lydie Ŝtastna kaj redaktorino de la loka Radio Jitka Stuchlíková. La redaktorino poste surbendigis intervjuon kun mi por la programero "Gastoj" de la Radio.

## Donaco de Gennadij Gluĥov el Rusio:

Oktobre rusa amiko Gennadij Gluĥov kun letero donacis al ni libreton kun 8 siaj versaĵoj en Esperanto. La

libro estis eldonita helpe de samideanoj en volga urbo Samara (inkluzive de nia aŭskultanto Vjaĉeslav Suslov). Plaĉas al ni ĉiuj liaj versaĵoj kaj ni esprimas koran dankon al Gennadij Gluĥov. Nun ni elektu unu el ili por komuna ĝuo:

### Kanto pri la Neĝo

En la ĉielo blankaj neĝeroj
Lante faladas al ter',
Inter la pinoj baletistinoj
Valson dancadas en la aer'.

Monda teatro, neĝa dancarto
Logas eliri nin el la dom'.
Tien eliras, ilin admiras,
Valson kun ili dancas la hom'.

Steldiamantoj al geamantoj
Brilas el nokta bela ĉiel'.
Kaj nia kanto en Esperanto
Sonu kaj brilu al ni verda stel'.

## Vintra Miraklo-lando de Monika Dallmer


Antaŭ nelonge, germana amiko Monika Dallmer sendis al ni fotojn kaj materialojn por Mikrofone. Ni elektis poemon "Vintra miraklo-lando" por komuna ĝuo. La poemo estas publikigita en la ĵurnalo <Stralsundaj Frekvencoj> de la E-Grupo el la urbo Stralsundo, Germanio. Koran dankon al Monika Dallmer.

Vintra miraklo-lando
Blanka prujno sur la arboj;
Brilas neĝ' en multaj farboj.
Ŝajnas branĉoj nun kristal'
Kaj glacias lag' en val'.
Intensa blu' jen ĉirkaŭ l' sun'
Radias kaj rigardo nun
Ekvidas neĝ' ĉe l' arbarrand'.
Ho, vi mirakla vintroland'!

*Laŭ Oskar Stock*

## Fotoj de Emma Breuninger el Germanio

Antaŭ nelonge, Emma Breuninger sendis al ni foton de sunleviĝo en malgranda vilaĝo apud la urbo "Ulm" en suda Germanio (apud la rivero Danubo). Ŝi loĝas en la 8-a etaĝo de la loĝeja konstruaĵo kaj tiu estas la vido el la kuirejo je la 7-a horo matene de aprilo, 2006. Oni vidas lageton, arbaron kaj la belegan sunon leviĝantan.





La alia foto estas tipa kolor-plena merkato en la centro de Meksik-urbo, kie ŝi loĝis dum la 80-aj jaroj.

## Kontribuaĵoj omaĝe al la 5-jariĝo de Mikrofone

### Artikolo de Lars Westman el Svedio:

Kia surprizo! Tute nova Mikrofone – bela kaj moderna, en kiu oni povas legi pri la vivo de junuloj en Ĉinio. Jen malnova historio el mia junaĝo antaŭ multaj jaroj.

**Du perloj**

La nomo de "Bua" sonas tre bele por mi. Bua estis malgranda fiŝkaptista loko ĉe la okcidenta sveda marbordo. Tie mi estis dum ses semajnoj kune kun 24 aliaj 13-jaraj knaboj. Post ses jaroj en la lernejo ni partoprenis en Somera Feriejo en Bua, dank' al aŭspicio de la Fondaĵo de riĉa bierfaristo, s-ro Egnell, Skovde. Post niaj ses semajnoj venis nova grupo kun 25 knabinoj.

En Bua mi loĝis en domo ĉe la fiŝkaptista haveno. Tie estis ankaŭ butiko, kie oni vendis ĉion por fiŝkaptistoj. Sekve la butiko havis interesan odoron. La kontaktoj kun la fiŝkaptistoj kaj iliaj boatoj estis tre interesaj al ni – knaboj. En la haveno estis 11 boatoj. Frumatene mi ofte vekiĝis de agrablaj sonoj de la boatoj, kiuj forlasis la havenon por fiŝkaptado sur la maro.



Ni ludis kaj nin banis kaj agrable pasigis la tagojn en Bua. Foje ni faris ekskurson al alia loko, kie mi trovis mitulojn en la maro kaj kun scivolemo malfermis kelkajn. Vidu –mi trovis du perlojn! Tiu fakto kaŭzis grandan aktivecon de ĉiuj knaboj. Ankaŭ ili komencis malfermi mitulojn ĝis nia instruisto malpermesis tion. Neniu perlo estis trovita krom la miaj du. Ho, kia babilado pro la perloj! Tre ofte mi devis montri miajn perlojn al la enviemaj amikoj, kiuj opiniis, ke mi estos riĉulo post forvendo de la perloj. La babilado ĉefe temis pri la demando: Kion mi aĉetu per tiel multe da mono. Tamen - kiam mi revenis hejmen post agrabla tempo en Bua, mi iris al butiko, kie oni konstatis, ke la perloj estas tute senvaloraj! Tiel malaperis mia tempo kiel riĉulo.


Mia edzino havas belan, oran ringon kun perlo, kiun mi trovis kiam mi estis 13-jara knabo.

## Fotoj pri bela Prago, Ĉeĥio

Antaŭ nelonge, ankaŭ ĉeĥa aŭskultanto Josef Kriz sendis al ni grupon da fotoj pri bela Prago. Inter niaj legantoj nemalmultaj estas amatoraj fotistoj, kiel Luit Staghouwer el Nederlando, Emma Breuninger el Germanio kaj aliaj. Kiam ili turisme vojaĝas, neniam preterlasas la bonŝancon por fari valorajn fotojn. Eble estas necese, ke en la estonteco ni aranĝu fotokonkurson.







# Mikronovelo – 微型小说



## Edzino

En tiuj tagoj, kiam Mei kuŝis en hospitalo, Weilai ĉiam ŝin akompanis.

"Rakontu ion el via historio, ĉu bone?" petis Mei iutage, kiam nur ili ambaŭ restis en malsanulina ĉambro.

"En mia infaneco..." Weilai ridetis kaj subŝovis litkovrilan angulon por Mei.

"Mi ne volas aŭskulti tion." Mei interrompis lin kaj flanken turnis la kapon.

Weilai bone sciis, kion Mei celas, tamen ĝuste tion li ne volis rakonti. Li trankvilige ellasis tiujn vortojn, "Ĉion mi jam diris al vi, ĉu ne?" Kaj li leviĝis, forlasis la liton, paŝis al la pordo, ĝin malfermis kaj eliris.

Mei kriis kaj vokis lin, tamen li ignoris.

Eble antaŭdestinite, Mei kaj Weilai geedziĝis. Kaj tio okazis kiel en filmo. Tiutage pluvis, Weilai sin ŝirmis sub alero. Baldaŭ junulino alvenis kaj, etendinte ombrelon super lian kapon, diris, "Ni estas samdirektaj." Kaj li konatiĝis kun ŝi. Kaj post 3 monatoj nupto okazis.

Post la geedziĝo ambaŭ ofte sidis unu kontraŭ la alia, silente kaj senmove. Al Weilai ŝajnis, ke la okuloj de Mei tre similas tiujn de lia antaŭa edzino. Tial li tute absorbiĝis en rigardado al ŝiaj pupiloj. Jam plurfoje, Mei laciĝis pro lia obseda rigardado kaj fine demandis, "Kial vi ĉiam rigardas miajn okulojn? Kial?"

Kvazaŭ vekiĝinte el sonĝo, li murmuris, "Nenio..." kaj leviĝis por ion fari.

En la kunvivaj tagoj Mei ĉiam lin amis kaj zorgis, sed foj-foje eksplodis de senkaŭza kolero, bruis kaj lin insultis. Siaflanke li restis tolerema, ĉar Mei estis ĉarma kaj, li pensis, ĉarma knabino havas fortan galon.

Nun, Mei estis mortonta.

"Kiujn vortojn vi volas lasi al mi?" Ŝin demandante, Weilai larmis.

"La samajn vortojn: Ĉiam kune kun vi, en la vivo, post la morto!" Kaj ŝi ridetis.

Li ekmiris, ĉar ŝiaj vortoj rememorigis al li la eksedzinon kiu, tre malbela, loĝis en alia urbo, en kiu ambaŭ pasigis almenaŭ 2 jarojn, dum kiuj ili kunvivis simple kaj monotone, tamen ne sen varmo. Poste li riĉiĝis el akcio. Portante eŭropajn vestojn kaj frekventante mondumon, li pli kaj pli sentis, ke ŝi ne meritas lian kunecon. Iun tagon li diris, "Ni disiĝu!"

Komence ŝi prenis lian parolon por ŝerco. Poste, iom surprizite, ŝi ridetis. "Mi jam ĵuris, ke en la tuta vivo mi restos ĉe vi."

"Vi pentos."

Almenaŭ duonan monaton li ne revenis al ŝi.

Poste, ŝi trovis lin en borsa halo. "50 mil juanojn al mi!"

"Por kio tiom da mono?"

"Por divorco!"

"Bone, sed post subskribo sur divorca papero!"

Post la eksedziĝo li forlasis la urbon kaj, kiel rakontite, konatiĝis kun Mei...

Farante vestoŝanĝon al Mei, Weilai eltrovis malgrandan ŝlosilon. Li rekonis, ke la ŝlosileto estas por delikata skatoleto kuŝanta ĉe kapkuseno de Mei en la hejmo, sed li neniam tuŝis la skatoleton, tial li ne sciis, kio estas en ĝi.

Post funebro Weilai sidis sola en la senmastrina hejmo. Tre enua, li enpoŝigis la manon por preni cigaredon, tiam liaj fingroj tuŝiĝis kun la ŝlosileto. Scivolo lin starigis kaj li alportis la skatoleton kiu estis gardanta en si kuracan registron pri tuta procezo de vizaĝa plastio.





# Tra la Mondo – 世界各地

## Komuna aranĝo de esperanto-asocioj de Francio en 2008

Celebre al la centjariĝo de la Unua E-Kongreso en Bulonjo ĉe Maro, ĉiuj esperanto-asocioj de Francio havos komunan aranĝon en 2008. La renkontiĝo okazos de la 21-a ĝis la 24-a de venonta marto, en Martigues, ĉarma havenurbo ĉe la Mediteranea Maro.

Estos diversaj prelegoj pri la vivo en la regiono, pri Esperanto-kulturfacetoj, distra programo kun konkurso kaj aliaj.

## ILEI-Konferenco en Benino

ILEI-Konferenco en Benino okazos en Portonovo, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2008, por ĝenerala programo kaj de la 5-a ĝis la 8-a de aŭgusto, 2008, okazos postkonferenca ekskurso. E¬stas invitataj esperantistoj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj kontinentoj! Via partopreno al la Konferenco estos kuraĝigo por la lokaj samideanoj kaj omaĝo al disvastigo de nia lingvo en la tuta mondo.

La okazigo de la Konferenco en Afriko en 2008 estos grava evento ne nur por la E-movado en la historio de ILEI E sed ankaŭ por la E-movado en Afriko.

*GBEGLO Koffi*

## La 5-a Azia E-Kongreso okazos en Hindio

La 5-a Azia Esperanto-Kongreso okazos en Bengaluro, Barato, de la 11-a ĝis la 15-a de februaro, 2008. Vin atendas la Kongreso kun riĉaj programeroj.

*Esperanto en Azio*

## Sukcese okazis la 39-a Korea Kongreso de Esperanto

La 13-an kaj 14-an de oktobro, okazis en Seulo la 39-a Korea Kongreso de Esperanto en Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj. La kongresa temo: "La vojo al diverskultura komunumo".

Al la kongreso partoprenis 163 personoj inkluzive de 11 eksterlandanoj el Francio, Svedio, Aŭstralio, Japanio kaj Ĉinio. La kongresanoj ĝuis simpozion pri la kongresa temo kaj aliajn programerojn.

*KIM Uson*

**Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia**

| UTC | Regionoj | Ondoj | kHz |
|---|---|---|---|
| 11:00-12:00 | Japanio, Koreio | 294,99 | 1017 |
| 13:00-14:00 | Sudorienta Azio | 25,75 31,78 | 11650 9440 |
| 19:30-20:30 | Eŭropo | 30,79 41,29 | 9745 7265 |
| 22:00-23:00 | Latin-Ameriko | 30,43 25,64 | 9860 11700 |
| 18:00-19:00 | Albanio kaj periferiaj landoj | | 1215 |

**Konstanta adreso:** Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040
**Tel:** +86(10)68891940 **Fax:** +86(10)68891164
**Retadreso:** espradio@cri.com.cn **Retpaĝo:** http://esperanto.cri.cn



Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renovigas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.

CRI Online
Esperanto

http://esperanto.cri.cn

（2007年第四期  总第20期）

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn
Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040